Socikultura bulteno
de Fokolar-movado

Aprilo 2019

# ‘Nova Urbo‘

UNUECO TRANS ĈIUJ KULTUROJ

> ni Pontu <

*Reto de la plej grandaj amaskomunikiloj prezentas tutmonde la hodiaŭn Brazilon kiel lando saturita per politikaj kaj ideologiaj malkonsentoj. Influitaj per ĉiutaga inundo de la komercaj tele- kaj radioprogramoj, ni povas kredi, ke Brazilo eniĝas je ideologia kaj politika dis-polusigo.*

## Brazilo – trans politikaj dividoj



Luís Henrique Marques, ĉefredaktoro de Cidade Nova (brazila versio de la “Nova Urbo”) montras la nekonatan veron ke, kadre de la tuta brazila socio, multaj civitanoj aktivas por la komuna bono. Tiuj potencaj novaĵ-fabrikoj ŝajnas pretervidi, ke Brazilo ne konsistas nur el politikaj disputoj aŭ ideologiaj konfliktoj. Trankvila agado de multaj “pioniroj” pruvas, ke tiu granda lando havas ankoraŭ la eblecon konstrui pace prosperon de la tuta socio. Faktoj pri alia flanko de la brazila situacio estas ankoraŭ izolitaj kaj eble nekonataj. Tamen ili ĉiuj montras la realan Brazilon, trans la politikaj kaj ideologiaj dividoj.



Komence oni devas rekoni ke, spite al la krizo kreita de la politikaj debatoj, multaj spertuloj emas rigardi Brazilon optimisme. Brazilanoj estas konvinkitaj, ke ili mem devas partopreni en la soci-ekonomia progreso. Laste formiĝas la t.n. “grupoj de dialogo” kaj ilia nombro multobliĝas. En diversaj regionoj de Brazilo, de Atlantika oceano ĝis Amazonio, renkontiĝas homoj de diversaj soci-tavoloj, religioj kaj politikaj konvinkoj, junularo kaj plenkreskuloj. Ili komencis diskuti pri la aktuala politika situacio, ties ŝancoj kaj obstakloj.

(La kompleta artikolo legeblas ĉe: https://familiaro.com ) .

## **Potenca kantaro de Peter Seeger** (Parto 1)

Antaŭ 100 jaroj (la 3an de majo 1919) naskiĝis la legenda patro de folkloraj kantoj (la t.n. "*folk music*") – Pete Seeger. Li kredis je la forto de bonaj kantoj kaj praktike lernis, ke komuna kantado kunigas la homojn. Kune, ili sentas sin fortaj, proksimaj unu al la alia kaj emas kunagi.






La voĉo de Pete eble ne taŭgis eble por opero, tamen ĝi estis tiel klara kaj forta, ke sufiĉis por kantigi homamasojn.

Lia socia agado ne ĉian plaĉis al registaroj sed liaj protest-kantoj popularas ĝis hodiaŭ en la tuta mondo, precipe inter junularo.



En la E-kulturo oni konas la kelkajn kaj vi aŭdos ilin en ĉi tiu artikolo, ekz:

**Guantanamera** (4:38) https://www.youtube.com/watch?v=h0gg3-xvMB0 .
**Neĝas, neĝas** ... (2:53) https://www.youtube.com/watch?v=b5cRHlzab60 .
**Jen nia mondo** (2:54) https://www.youtube.com/watch?v=Pky6dDVswKM .

(La kompleta artikolo legeblas ĉe: https://familiaro.com ).

## Junularo unuiĝas por diri "NE" al ĉikanado

*La projekto "Kial vi ŝatas ĉikani?" (Why are you a bully? /Perché sei un bullo?) celas al trejnado de pli ol 10-jaraj gejunuloj, por ke ili helpu al siaj samaĝuloj alfronti tiun socian fenomenon. La dekkelk-jaruloj lernas kompreni kion signifas ĉikanado por efike ĝin evitigi. Sekve ili estas kuraĝigataj defendi la viktimojn de tiaj situacioj.*



Ĉikanado (ang: bullying) estas la ripetata konduto, per kiu pli aĝaj infanoj timigas kaj insultas siajn samaĝulojn. Tio estas, bedaŭrinde, la disvastiĝnta fenomeno inter gejunuloj – same en interpersonaj rilatoj, kiel per elektronikaj komunikiloj.





Kion oni povas ĉi tie fari? Unu el la projektoj nomiĝas bRet-Asocio (bNetAssociation), lan ĉita kiel branĉo de **Reta Projekto Paco** (RPP – Rete Progetto Pace / Peace Network Project).



Ĝi funkcias kadre de Internacia Reto de Lernejoj, kunlaboranta kun similcelaj institucioj kaj asocioj por antaŭenigi kulturon de paco.

Ĉikanado estas la rezulto de konflikto kaj ni kredas, ke la plej bona maniero ĝin haltigi estas instrui la infanojn pri fontoj, kiuj ĝin estigas. Sekve ni konigas la infanojn /gejunulojn kun la metodoj bezonataj por solvi tiuspecan problemon. Tiam ili povas pli efike kaj decideme apogi unu la alian.

(La kompleta artikolo legeblas ĉe: [https://familiaro.com](https://familiaro.com) ).

---

*Fortoj de la vivo*

**Financa subteno**

Unu patro de granda familio devis urĝe veturi al hospitalo por operacio. Kiam mi eksciis, ke li ne havas monon, ni kun kelkaj kolegoj komencis aranĝi por li financan subtenon. Aliĝis ankaŭ niaj kunlaborantoj. Kolektinte la necesan sumon, ni akompanis tiun patron al operaciejo kaj pagis por tiu medicina servo. Ĉio finiĝis bonorde kaj mi ne scias kiu estis pli feliĉa – familio de la paciento ol nia helpa grupeto. Mi pensas, ke eĉ tiel malgrandaj agoj ankaŭ povas kontribui al paco.

(*N.J. - Jordanio*)



**En flughaveno**

Dum pakaĵ-kontrolo, staris antaŭ mi unu pasaĝero, konsternita ĉar oni malpermesis lin kunporti konfitaĵon. Li diris nervoze al la doganisto: "Almenaŭ ne forĵetu ĉi tiun konfitaĵon, kiun faris mia patrino por siaj genepoj. En tiu bokalo (glasa ujo) troviĝas ŝia tuta amo". Sekve li aldonis malgaje: "Kial ĉi tiu mondo devas esti regata tiel? Mi komprenas kio kaŭzas tiel severan sekurecon. Sed ĉu ankaŭ en tiuspecaj konstruaĵoj devas regi timo kaj malfido? Kie malaperis beleco de nia vivo? "

Mi ne respondis al tiuj demandoj. Intertempe unu knabineto venis en rulseĝo. Dum ŝi pasis nian starvicon, ni rimarkis rideton sur ŝia vizaĝo. La feliĉa vizaĝeto silentigis nin komplete. Jen ĉio, kion ni bezonis tiumomente. Unu simpla rideto altigis nin, jam antaŭ la flugo.

(*C.M. el Aŭstrio*)

**Surpriza repago**

En nia vilaĝo vivas knabo kun tre difektitaj dentoj kaj lia malriĉa familio ne havas monon pagi por tion kuracigi. Iutage mi volis venigi lin al dentisto, sed intertempe ni orientiĝis ke ĉiuj pacientoj estas tie riĉaj homoj. Fidante Dian providencon, ni decidis tamen iri tien. Post la komenca interperolo, la dentistino demandis, ĉu ni povos pagi por la multekosta proceduro. Mi respondis, ke nia amika grupeto organizis apudstrate disvendadon por pagi la prezon.

La doktoro ekmiris, volis scii kiel ni tion faris kaj diris: "Vi povas pagi nur tion, kiom vi havas hodiaŭ. Ne zorgu pri la cetero". Ni tre dankis al ŝi kaj, antaŭ nia foriro, ŝi vokis nin kaj konkludis: "Vidu, mi nun havas grandajn malfacilaĵojn. Do mi ekpensis ke vi ne pagu al mi, sed bonvolu preĝi ke miaj problemoj bone solviĝos". Ni plenumis tiun peton kaj post kelka tempo la dentistino informis nin, ke nia vizito portis al ŝi pacon kaj ĝojon helpi la homojn. (*G.B. - Filipina Insularo*)

*

Città Nuova /New City estas socikultura magazino eldonata de Internacia Fokolar-Centro en Italio kaj en kelkdeko de aliaj lingvoj /landoj: ARGENTINO – *Ciudad Nueva*; AŬSTRALIO – *New City*; BELGIO - *Nieuwe Stad*; BRAZILO - *Ciudade Nova*; BRITUJO - *New City*; BULGARIO - *Nov Svjat*; ĈILIO – *Ciudad Neava*; ĈINIO (Hongkongo) - *San Sin Seung*; DANLANDO - *Ny Stad*; **ESPERANTUJO** - *Nova Urbo*; FILIPINOJ - *New City*; FRANCUJO - *Nouvelle Cite*; GERMANIO - *Neue Stadt*; HISPANIO - *Ciudad Nueva /Ciutat Nova* (en kataluna lingvo); HUNGARIO - *Uj Varos*; JAPANIO - *Uno*; KANADO - *Nouvelle Cite*; KENIO - *New City /Nouvelle Cite*; KOLOMBIO - *Ciudad Nueva*; KOREUJO - *Kumul*; KROATIO - *Novi Svijet*; LIBANUJO – *Citte Nouvelle*; NEDERLANDO - *Nieuwe Stad*; OCEANIO - *New City*; POLLANDO - *Nowe Miasto*; PORTUGALIO - *Cidade Nova*; RUMANIO - *Oras Nov*; SLOVAKIO - *Nove Mesto*; SLOVENIO - Novi Svet; SVEDIO - Enald Varld; SVISLANDO - Citta Nuova; URUGVAJO - Ciudad Nueva; USONO – *Living City*; VENEZUELO - *Ciudad Nueva*.

# La Torĉo


*Hardu sane la korpon*



**Du semajnoj sur glacio** (Parto 2)

La surglacia, 15-taga marŝo estis por mi ne nur la defio. Nenio kompareblas kun la magio de izolitaj lokoj, malproksimaj de amasa turismo. Jen – estas nur vi kaj la naturo. Imagu, kiel mirindaj estas tie ĉi sunleviĝo aŭ sunsubiro!





Mia ĉiutaga marŝo daŭras kutime 12 horojn, dum kiuj mi trairas (depende de la vetero, surfaco de glacio kaj de aliaj cirkumstancoj) 40 ĝis 60 kilometrojn. Pasinte duonon de la planita itinero, mi estas iom laca sed fartas sufiĉe bone. En malvarmo kaj ventoj, mia vizaĝo doloras pro la frostiĝo. Tio ne estis nur simpla promeno. Komplikis ĝin ankaŭ la sledo kiu, precipe en malbona vetero, ofte renversiĝis sur elstarantaj pecoj de la glacio. Foje, tiuj glaci-pecoj povas havi surprize belajn formojn.



Aliflanke – ĉu vi kredus, ke oni ankaŭ povas muzikumi per glacio? (4:27)
https://www.youtube.com/watch?time_continue=75&v=en0p1Y35p3w .

Post kelktaga soleca marŝo, kia plezuro estas renkonti la homojn, en forgesitaj vilaĝoj ! Tio estas la plej interesa parto de ĉu vojaĝo: ekvidi kiel oni vivas en diversaj landoj. Dum mia Bajkala aventuro, mi spertis ĉie koran gastamecon de la homoj loĝantaj en tiu regiono. Nekredebla feliĉo estas dormi en varma ĉambro! Matene mi repakos la ekipaĵojn kaj revenos al mia vojo, glacoplena kaj soleca. Kaj tion mi spertis multfoje sur ĉi tiu "siberia maro". En tia medio vi sentas multe pli ol iu ajn. Travivante mirindajn momentojn, mi faris tie multe da fotoj. Tion mi volonte dividas kun vi.

(Pluaj fotoj videblas ĉe: https://familiaro.com ).

---

## **Esperi – malgraŭ ĉio** (Parto 2)



Kiam sieĝas vin obskuraj pensoj, rigardu la nubojn sur ĉielo.

### Mia interesiĝo pri astronomio

**NU** (demando)**:** *Unu el viaj libroj enhavas la informon, ke vi tre interesiĝis pri astronomio. Kial?*

**JZ** ( p. Jozefo Zielonka, respondo)**:** Observante la naturon kaj rigardante al ĉielo, mi ekstaris senmova en fascina miro. Kiel belega estas tio, kiel perfekte organizita! La sciencistoj supozas, ke la kosmo ekzistas jam miliardojn da jaroj sed post kelkaj miliardoj ĝi povos malaperi, ĉar ĉiuj steloj kaj galaksioj konstante forkuras en nekonatan malproksimon.



Lakta Vojo, al kiu apartenas nia sunsistemo. Ĉi tiu galaksio plej bone videblas de Sudameriko.

Sed ne tio estas la plej grava. Oni asertas, ke kosmo havas sian komencon kaj havos la finon. Ĉiuj galaksioj forkuras ien kun la rapideco de 20 milionoj da kilometroj dum sekundo. Venos la tempo kiam eĉ en la satelita teleskopo Hubble ne eblos ilin vidi. Ĉu restos nur nia Milka Vojo?

(Plena intervjuo ĉe: [https://familiaro.com](https://familiaro.com) ).

---



# Nia Vilaĝo

*Homo kaj naturo*



Utilaj plantoj:

**Majfloro – konvalo** (*Convallaria majalis* L.)

En la 15a jarcento oni nomis tiun ĉi planton *Lilium convallium*, kio signifas "lilio el valo" (latine *convállis* = profunda, ĉirkaŭita per montoj valo). Por evitigi konfuzon kun alia lilio, sveda patro de la botanika taksonomio – Carl von Linné (**Linnaeus**, eo: Karolo Lineo) enkondukis la nomon *Convalaria majalis* ĉar konvalo plejofte floras meze de majo (en norda duonglobo).



Origine, tiu ĉi planto konvras preskaŭ la tutan Eŭropon kaj nordan Azion (ĝis Koreujo kaj Japanio). Nature, ĝi plej multas en duon-ombro de foliaj arbaroj, tie per sia radikaro (rizomoj) la planto disvastiĝas je grandaj kolonioj.Konvalo estas plejofte uzata por du celoj, kiel ornam-planto kaj por medicino.



La eltranĉitaj flor-tigetoj estas ofte uzataj en vazo. Oni volonte kreskigas konvalon en ĝardenoj, ĉar ties blankaj, sonoril-formaj floretoj belodoras intense, per unika aromo.

---